# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

8a jarkolekto n-ro 1
januaro 1988

A T E N T I N D A Ĵ O J

| |
|---|
| NI INVITAS ĈIUN MEMBRON DE F.E.L. AL LA JARKUNSIDO KIU OKAZOS SABATON LA 12-AN DE MARTO 1988 JE LA 14H EN LA ESPERANTO-CENTRO EN ANTVERPENO. NI PETAS LA GRUPESTROJN INVITI LA F.E.L.-MEMBROJN. |

F.E.N.-INFORMTAGO 1988

Denove la F.E.N.-laborgrupo pri ĝenerala informado organizas informtagon.
Ĉifoje la temo estos : "Kiel ne perdi novajn Esperanto-lernintojn?"
Oni ja ofte spertas ke el entuziasma kursanaro restas nur unu aŭ du personoj kiuj daŭrokupiĝas pri Esperanto post la kurso.
En la matena programo, kvar personoj reprezentantaj lande kaj regione aktivajn Esperanto-grupojn, rakontos pri siaj sukcesaj agadoj.
Posttagmeze estos ebleco por interŝanĝi viajn opiniojn.
Tiun eblecon ni enprogramigis ĉar oni opiniis dum la antaŭa informtago la informadon tro unudirekta.
La informtago okazos je la 19-a de marto 1988, de la 10h30 ĝis la 16h, en la Esperanto-domo en Den Haag.
La kotizo, kiu inkluzivas sup- kaj panmanĝon, estas 12,50 guldenoj.
Aliĝu ĝirante 12,50 guldenojn al ĝirkonto 2315416, nome de N.G.G.E., Rosmalen antaŭ 5.III.1988, indikante F.E.N.-informtago.
Aligintoj ricevos detalan informilon en marto.
Pliaj informoj : Gerard Gerritse, Valkeniersingel 43, NL-5241 JC Rosmalen.

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. - Jarabono: 150 BEF - Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 - Respondeca eldonanto *(verantwoordelijke uitgever)*: Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.

---

**ESTRARO**

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Edward Symoens, vicprezidanto, Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 66.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 06.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem.
Hilde van Ingelgem, grupa agado, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.

**KOMISIONOJ**

**Financoj**: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 17 22.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.

---

# P R O T O K O L O

pri la F.E.L.-estrarkunsido de sabate la 9-an de januaro 1988 en Antverpeno

---

Ceestis : Jan Bovendeerd (JB), Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Alex Humet (AH), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Hilde Vaningelgem (HV)

Komenca horo : 10h30

Prezidis ID, protokolis MC

## 1. ANTAŬA PROTOKOLO

Aprobite kun jenaj aldonoj kaj rimarkoj :
- unua paĝo : post la nomo RR, aldoni la vorton "kasisto", post AH "instruado", post ES "vicprezidanto", post HV "intergrupa agado".
- rilate al la "komisionoj", ID telefonos al Petro De Smedt kaj al Erik D'Hondt por eventuala forstreko de la nomo.
- rilate al la "planoj", en la F.E.L.-kunsido okaze de la Semajno de la Internacia Amikeco en Loveno je la 27-a de februaro, ni klarigos la planojn (starigo, k.t.p.). La grupoj povas diskuti ilin kaj eventuale aldoni novajn ideojn.

## 2. HONORA KOMITATO DE LA JUBILEA JARO

Al la honoraj komitatanoj estos sendita la revuo EP kaj la Esperanto-dokumentoj kune kun aldona letero, kiun ID faros.

## 3. SONORILO

La 22-an de decembro 1987 kunvenis en Antverpeno MC + ID + PP + Grégoire Maertens (administranto de S) + Roger De Schepper. Monique kaj Patrick De Schepper forestis. GM proponis specon de kontrakto kiu celas aranĝi la rilatojn inter F.E.L. kaj S en la teritorio de Belgio. (vidu ankaŭ alia paĝo en "Informilo") Okaze de ĉi tiu kunveno, ID kandidatiĝis por administranto de Sonorilo. La administrantaro de S pritraktos tion en la ĝenerala kunveno.

## 4. LIBROSERVO

- Ni konstatas ke ĉeesti Esperanto-renkontiĝojn kun librostando havigas pozitivajn rezultojn (Limburgo, Bruselo, Gent, I.F., ...)
- Ni invitas la diversajn grupojn por aranĝi ekspozicion en la urbaj bibliotekoj.
- La oficiala antaŭkongreso de U.E.A., kiu okazos de la 16-a ĝis la 23-a de julio 1988 en Epen (NL) invitis la libroservon de F.E.L. PP ellaboros la organizadon.
- RR ricevis informojn pri libroj el Irano (i.a. Omar Kajam en tridek lingvoj) kaj demandas ĉu indas aĉeti kvanton se kondiĉoj estus interesaj ? La estraro unuanime apogas tiun proponon: RR verkos artikolon por EP.

## 5. DEPONI LERNOLIBROJN EN BUTIKOJ

Ni provos distribui la pakaĵon de 't Spectrum al la kluboj por ke ili prizorgu kontakton kun lokaj librobutikoj, kun interesaj kondiĉoj por la klubo kaj la butikoj.
Cajot konsentis. 't Spectrum België iĝis nun "Libridis" (kunfandiĝo de 't Spectrum kaj i.a. la distribua servo de Standaard).
Konkrete, la ideo de ID estas jena : doni al la klubo pakaĵojn por deponi ĉe librobutiko, kaj afiŝon por pendigi. Ne nur la librobutiko havu procenton je la venditaj varoj, sed ankaŭ la grupo (enspez-ebleco). Se ni iras tiun vojon, ni devas prepari kontraktojn inter F.E.L., librobutiko, klubrespondeculo. ID preparos tekstojn.

MALFERMA ESTRARKUNSIDO DE FLEJA, JE 20/12/87 ĈE PATRICK HAERICK EN GENTBRUGGE

Ĉeestantoj : Katrien Batsleer, Patrick Haerick, André Ruysschaert, Wim Tytgat, Eddy Van den Bosch (ĝis 12h15), Jean Pierre VandenDaele.

Komenco : 10h30

1. FINANCOJ (Wim)

Eŭropaj festoj : Wim intertempe pagis al FEL la fakturon pri libroj nerevenintaj de Bruselo. Dume estis ne jam ĝirita la sumo de 2000 BEF kiun Klubo 100 antaŭvidis por FLEJA-agado tie.

2. 10A JUBILEA FLEJA-SEMAJNFINO (Patrick)

Financoj : ne ĉiuj fakturoj alvenis, tamen jam konstateblas ke la gajno estas ĉ. 3000 BEF. Car FLEJA aparte pagis la akceptokostojn, la semajnfino laŭ financa vidpunkto tiel estis preskaŭ sengajna. Ankaŭ la subvencio de ĉ. 8000 BEF ne jam estas ĝirita al nia konto (alveninte ĝi povas esti konsiderata kiel gajno kongresa). Dum sabato estis 110 da partoprenantoj. Laŭ la enketilo la kongresanoj estis ĝenerale kontentaj pri la ejo kaj prelegoj, malpli tamen pri la dancvespero.

3. FLEJA

3.1. Vojaĝkostoj

La regulo pri vojaĝkostoj aperinta post la jarkunveno en 1982 restas senŝanĝa kaj estas uzata kiel gvidilo.

3.2. Membreco

kodo "fl" : membro de FLEJA ĝis 26 jaroj : 400 BEF (inkluzive de FEL-membreco). Ni ricevas de FEL 150 BEF. Membroj ricevas : Esperanto-panorama kaj JEN.

kodo "sfl" : familia membro junula de FLEJA. Ek de la dua infano. La unua infano estas konsiderata kiel FLEJA-membro.

kodo "d" : subtenanta membro de FLEJA : 500 BEF, tiun ĉi sumon ni ricevas entute. Membroj ricevas : JEN kaj Koncize, sed ne estas konsiderataj kiel membro de FEL.

3.3. Estonteco

Okazis sufiĉe longa interparolo pri la fakto ke la estraro de FLEJA maljuniĝas kaj kiel atingi junulojn. Ĉu pere de unutagaj aktivecoj (kiel en Nederlando ekzemple). Por pli bone scii la nunan situacion pri la nombro de junuloj petintaj informojn pri Esperanto Jean Pierre faros liston pri ĉiuj informpetintoj sub 30-jaraj.

3.4. 11a FLEJA-kongreso

La ejo en Dendermonde ne haveblas, tiel estas necesa serĉi alian lokon. Katrien preferas por denove zorgi mem pri la manĝaĵoj. Dato : lasta semajnfino de oktobro.

3.5. FEL-kongreso en aŭgusto 88

Propono kiel junulara aktiveco : genta pupteatra trupo kiu estis en Zagrebo povus prezenti ion dum ĉi tiu kongreso. Ankaŭ FLEJA ŝatus diskuti pri nia estonteco kun FEL-estraranoj.

4. INTERŜANĜOJ

4.1. Poloj

Necesas demandi al Ite antaŭ la ĝenerala kunveno kiom da tagoj restas kaj kiom da homoj povas iri interŝanĝe.

FEL 090188 FLEJA 201287 doroflanke!

6. LERNEJA PROJEKTO

Ne estas novaĵo. Homoj kiuj reagis al la elsendo en "Kilimandjaro" ricevis leteron kun informoj pri la lerneja projekto.

7. "HAPPENING VLAANDEREN LEEFT" → prokrastita → aŭtuno

AH kontaktos Dirk De Weerdt denove por renkonto kaj finpretigo de la ekspozicio antaŭ la malfermo (23.IV)
AH krome informos pri prezo de la granda ekspozicio de U.E.A.
ID informos pri la komputera programo de Eindhoven.

8. PERKORESPONDA KURSO

Ĉu oni en Nederlando efektive jam reviziis la kurson ? AH informos pri tio. Kio kun la sonbendo tiam ?

9. INTERŜANĜO KUN NEPAGIPOVAJ LANDOJ

... skribis al Bulgario; PP al Ĉinio. Ni atendas la respondojn.

10. PROVINCO ANTVERPENO

F.E.L. estas membro de la Kultura Konsilio de la provinco Antverpeno en kiu ID sidas.
Kvankam la Konsilio konsilis ke F.E.L. ricevu 50.000 BEF (anstataŭ la 5.000 kiun ĝi ricevis ĝis nun), la deputitaro decidis je ± 5.500 BEF.
Ĉu indas denove protesti kaj kunmeti dosieron ?
ID + PP aldonos leteron al la provinca subvencipeto.
AH iĝos anstataŭanto de J.B.

11. AFIŜOJ

Malbona starto. PP sendos afiŝon kun leteron al ĉiu prezidanto de ĉiu grupo en Flandrio. ID vizitos ĉiujn klubojn kaj proponos

12. DIVERSAĴOJ

Aldoni ĉe la listo de planoj de F.E.L. (vd. Informilo nr. 10) sub punktoj prioritataj : "Disvendo de la programoj de Ray Gérard", komenco jan88, sen fino, respondecas Ray, Paul, Ivo.

dato de la sekvonta kunsido : 13.II.1988.

fino : 12h50.

---

Ni ricevis de la laborgrupo pri informado de la Federacio de Esperanto-organizaĵoj en Nederlando la jenajn tri broŝurojn, tre taŭgajn por lokaj grupoj :

HET INRICHTEN VAN EEN INFORMATIE-AVOND (18 paĝoj)

TIPS VOOR PLAATSELIJKE GROEPEN (19 paĝoj)

ORGANISATIE VAN KURSUSSEN (16 paĝoj).

Ili estas senpage riceveblaj ĉe
Esperanto-Centrum Nederland
Riouwstraat 172
NL-2582 HW Den Haag

4.2. Jugoslavoj

3 homoj dum 10 tagoj povos iri al Zagrebo (al IJK aŭ poste). Tiu ĉi nombro povos esti pligrandigata. Laŭ la kontrakto kun Jugoslavio ni repagos la vojaĝkostojn de la jugoslavoj ĝis maksimume 50 %. Kondiĉo interŝanĝa : la interŝanĝantoj prezentu ion en Zagrebo kaj FLEJA-semajnfino respektive. Jugoslavoj povos post la semajnfino resti en Belgio.

5. JEN/KONCIZE

5.1. JEN

Fine de februaro estos sendata rememoriga letero al tiuj kiuj ne jam pagis sian kotizon por la kuranta jaro '88. Jean Pierre faros liston de nunaj JEN-abonantoj.

5.2. Koncize

En la lasta numero de Koncize ĉi jara Jean Pierre enmetos pagigan leteron por tiuj kiuj ĝin ricevis kiel provabono. Por la estonta jaro li elektos aliajn personojn provabone.

6. ESTONTAJ KUNVENOJ DE FLEJA

6.1. Ĝenerala kunveno

Invitiloj povus esti kune sendataj kun la invitiloj de la semajno de internacia amikeco en Leuven, post interkonsento kun Françoise. En nia invitilo estu aldonita ke la vojaĝkostoj estos repagitaj avertinte la sekretarion en la antverpena adreso. Ĉi lasta ankaŭ prizorgas la invitilojn.
Patrick anoncos nian ĝeneralan jarkunvenon en la venonta numero de JEN. La ĝenerala jarkunveno okazos la 27an de februaro je la 10a horo.

6.2. Estrarkunsido

Estonta malfermita estrarkunveno okazos la 28an de majo antaŭ la serĉpromenado en Gento.

Fino : 13h

Protokolis : Jean Pierre VandenDaele.

---

**Pli ol cent mencioj**

En la daŭro de 1987, Esperanto estis menciita pli ol cent fojojn en la flandra gazetaro. Ni statistikis 61 grandajn artikolojn, 74 malgrandajn, kaj 26 nurajn menciojn. Krom tio 30 radio- kaj tv-programoj menciis Esperanton.
En la valona gazetaro ni trovis entute 146 artikolojn. Se ni adicias ĉiujn ciferojn ni atingas por tuta Belgio 307 menciojn en unu jaro. Gratulinda cifero!

**REAGO**

En unu el la antaŭaj numeroj de *Informilo* aperis kelkaj informoj pri la misfunkciado de libroservo "Sonorilo". Jen kiel reagq al tiu artikolo letero de la administrantaro de tiu libroservo:

Enkonduko: la ekzistado de du libroservoj en nia lando ne estas problemo ĉar la merkato ne estas kongruanta, la problemo ekestis pro malfacilaj homaj rilatoj.

Respondo laŭ la punktoj el la malferma letero:

1. Sonorilo fondiĝis per la kapitalo de du A.S.P.C. : Belga Esperanto-instituto kaj Flandra Esperanto-instituto, la administrantaro konsistis el estraranoj de B.E.F. elektitaj inter la iamaj estraranoj de Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj de Flandra Ligo Esperantista. Poste la administrantaro ĉiam ekzistis pro partoprenado de estraranoj de B.E.F, F.E.L. kaj A.P.E., ĝis kiam F.E.L. rezignis.

2. La nunaj gvidantoj de SONORILO estas Demonty M., De Schepper Roger, Mertens Goossens A., Fichefet-Jacquet S. kaj Maertens G. La honorofica direktorino estas De Schepper Monique.

3. ĝis 6 : Ni ne konfuziĝu inter SONORILO kaj personoj kiuj apartenas al la sama familio De Schepper kiuj laŭ propra kaj memstara maniero volas labori por Esperanto. SONORILO ne povas esti la juĝanto pri informado, ja temas pri la tereno de F.E.L. Ni ne povas kritiki nek interveni.

7. Prave,kaj haltigita agado fare de la administrantaro

8. La libretoj de Witteryck elĉerpiĝis en kelkaj semajnoj.

9. ĝis 16. Ni publikigas ĉi poste la bilancon kaj la spezokonton de SONORILO. La havaĵo - kiu estas rezervita profito de kelkaj jaroj - plialtiĝis de 82 ĝis 86 de 250.000 Bef al 475.000 do ekzistis profito de jare kaj meze 60.000 Bef. La pligrandiĝanta kapitalo estis uzita por pligrandigi la librostokon, kun la scio kaj subteno de la administrantaro.

Jarbilanco 1986

| Aktivo | |
|---|---|
| Stoko | 544.586 |
| Ŝuldoj de klientoj | 41.820 |
| Ŝuldoj de liverantoj | 3.570 |
| Disponebla mono | |
| kaso | 13.549 |
| ŝparkonto | 28.364 |
| pĉk | 20.805 |
| banko | 13.509 |
| | 666.203 |

| Pasivo | |
|---|---|
| Havaĵo | 475.273 |
| Ŝuldoj al S-ro Verstraeten | 100.000 |
| Ŝuldoj al klientoj | 1.449 |
| Ŝuldoj al liverantoj | 89.481 |
| | 666.203 |

Spezoj 1986

| Kostoj | | Enspezoj | |
|---|---|---|---|
| Aĉeto de libroj | 250.118 | Vendoj | 450.737 |
| Oficejaj materialoj | 36.199 | Rentumo | 786 |
| Presaĵoj | 24.037 | | |
| Pakmaterialoj | 7.533 | | |
| Kotizo fakgrupo | 7.261 | | |
| Telefono | 2.000 | | |
| Afranko | 32.505 | | |
| Dogankostoj | 4.547 | | |
| Anoncoj | 19.899 | | |
| Kostoj por borsoj kaj librostandoj | 17.757 | | |
| Asekuro | 1.698 | | |
| Impostoj | 1.177 | | |
| Kurzdiferencoj kaj bankkostoj | 1.216 | | |
| Dokumento | 2.830 | | |
| Gajno de la jaro | 42.746 | | |
| | 451.523 | | 451.523 |

ANTAŬJUĜOJ

Antaŭjuĝo estas eklipsigo de nia kapablo por racie prijuĝi situaciojn. Eĉ plej racia argumentado ne tuŝas homojn, kiuj rakontas antaŭjuĝojn. Male, ili mem opinias sian starpunkton tute racia kaj nepridubinda.

Kia sintenado eblas se ni konfrontiĝas kun antaŭjuĝoj ?

Jen tri eblecoj :

1) Antaŭjuĝo signifas ke parto de la realo forfalas el la menso de la persono kiu prononcas ĝin. Do, necesas kompletigoj. Tiujn kompletigojn ni plej facile povas akiri per tre konkretaj demandoj.

Ekz. "Mi ne povas fari tion!" - "Kial vi ne povas fari tion ? Kiu ekzakte malpermesas tion al vi ? Kio okazus se vi tamen farus ĝin ? Ĉu vi jam provis tion ? Ĉu vi konas aliajn personojn kiuj faris kion vi ne kuraĝas fari ?..."

Plej ofte la normoj kiujn ni heredis de niaj edukintoj bremsas nian pensokapablon ĉe antaŭjuĝo. Se vi respondas per aliaj normoj ("Mi ne kuraĝas fari tion!" - "Vi devas fari tion!") tiam la tuta konversacio fariĝas sensenca kaj senelira.

Ekz. ; Tio ŝajnas al mi kompleta frenezaĵo.

Aĥ ne! Ĝi tute ne estas frenezaĵo. Ĝi estas tre serioza afero.

Mi ne povas kredi tion.

Diable! Mi povas aserti al vi ke pri tio okupiĝas ...

Fek! Lasu min trankvile kun viaj stultaj ideoj. Por mi ĝi estas kaj restas stultaĵo. Kaj nun mi havas urĝan laboron por fari.

2) Se la unua rimedo ne helpas, kaj via kunulo daŭre ripetas siajn antaŭjuĝojn, necesas rekta, nemiskomprenebla konfrontiĝo.

Ekz. : Tio, kion vi ripetas nun por la kvina fojo estas antaŭjuĝo senbaza kaj nun mi volas ke vi ne plu ripetadu ĝin!

3) Fakte, tiu kiu diras antaŭjuĝojn invitas vin por fari psikologian ludon, alivorte li invitas vin al sensenca diskutado. Sed malfacilas ludi serpentuman ludon kun rekta individuo. Iu metodo povas esti nenion plu respondi, eble rektigi la torson kaj resti kiel eble plej neŭtrala en siaj reagoj.

Ankaŭ tre efika estas la eligo de ununura vorteto : "Ĉu...?"

ID